ZDRUŽENJE ZA ESPERANTO SLOVENIJE SLOVENIA ESPERANTO-LIGO

# INFORMACIJE INFORMOJ

Leto / jaro 10, št. / n-ro 4 December / decembro 2004

## Vinko Ošlak presenetil na srečanju ob Zamenhofovem dnevu v Celju

Letošnje srečanje slovenskih esperantistov ob Zamenhofovem dnevu je bilo v soboto 11. decembra 2004 v restavraciji Majolka v Celju. Udeležilo se ga je okrog 20 članov in nečlanov ZES.

Med delovnim delom srečanja od 10. do 13. ure so udeleženci po uvodnem delu poslušali predavanje Tomaža Longyke, ki je v esperantu predaval o kongresu v Pekingu in pri tem pokazal, kako je v kratkem času izredno napredoval v znanju esperanta. Nato je Zlatko Tišljar predstavil projekt »Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio 2007 en Maribor«.

Vse udeležence srečanja je presenetil Vinko Ošlak, najprej z novico, da bo Mladinska knjiga izdala njegov prevod pesmi Srečka Kosovela, nato pa s predstavitvijo in predajo rokopisov treh svojih del ZES: obsežnega učbenika »Esperanto za samouke (po metodi in vzgledu prof. Rudolfa Rakuše). Celovec 2005«; kratkega učbenika »Esperanto v petih lekcijah. Učbenik osnov mednarodnega jezika esperanta = Lernolibro de baza Esperanto. Klagenfurt / Celovec / Klaŭdiforumo 2004« in prevod dela »Dr. Ludvik Lazar Zamenhof. Fundament esperanta. Poslovenil, priredil, dopolnil in komentiral Vinko Ošlak«.

Sledil je pogovor o delu ZES in načrtih za leto 2005. Po kosilu je potekal neuradni del srečanja.

## 90-a Universala Kongreso de Esperanto, Vilno, Litovio , 23-30 julio 2005

**Kongresoj kunigas tutmondan esperantistaron**

Kiu ne konas la Universalajn Kongresojn — la plej grandan jaran manifestacion de la Esperanto-movado? Kulturfestivalo, tutmovada forumo, turisma festo, ili restas por multaj la definitiva pruvo ke Esperanto vivas kaj prosperas.

Ĉiujare UEA organizas la kongreson en alia lando, provante respekti la geografian distribuon kaj organizajn fortojn de la movado. Ĉiuj kongresoj havas similan karakteron, kun iom da ŝanĝoj de jaro al jaro. Estas intelektaj programeroj (debatoj pri la Kongresa Temo, Internacia Kongresa Universitato, prelegoj pri la kongresa lando), artaĵoj (nacia kaj internacia vesperoj, koncertoj, teatraj prezentoj, Belartaj Konkursoj), kaj amaso da primovadaj kunsidoj (Komitato de UEA, fakaj asocioj, kunsidoj pri specifaj temoj). Estas Tagoj de la Libro, de la Lernejo, de la Paco. Estas granda libroservo. Mallonge, ĉiu povas trovi ion laŭ sia gusto, kaj multaj simple uzas la okazon por interamikiĝi kaj pasigi la tagojn en agrablaj ekskursoj kaj babilado.

KONGRESO de ESPERANTO 90a UNIVERSALA VILNIUS 2005

Membroj en la kategorioj MJ kaj MA ricevas fortan rabaton ĉe la kongresa kotizo. Ankaŭ kongresa aliĝo antaŭ la fino de la antaŭa jaro kunportas grandan ŝparon. Gejunuloj ĝis 19-jaraj aliĝas senpage; tiuj inter 19- kaj 30-jaraj ricevas rabaton. Estas grave resendi la mendilon kaj la pagon por ĉiuj aranĝoj antaŭ la 1-a de majo de la koncerna jaro. Ĉiu korespondado okazas tra la Centra Oficejo kaj ne tra la Loka Kongresa Komitato. Vidhandikapitaj aliĝintoj al UK ricevas la ĉefajn materialojn surkasede kaj la programon brajle. Ĉe la kongreso oni ricevas Kongresan Libron, kiu detale prezentas la programon de la semajno. Ĉiutage aperas la tiel nomata Kongresa Kuriero, kun interesaj raportoj kaj utilaj informoj pri okazaĵoj kaj eventualaj programŝanĝoj.

## Estontaj Universalaj Kongresoj

**Florenco** - 29 de julio - 5 de aŭgusto 2006

**Jokohamo** - 4-11 de aŭgusto 2007

## Internaciaj Junularaj Kongresoj

La kongresoj de TEJO estas malpli amasaj, kaj pli varias de jaro al jaro, ol la UK-oj. Preskaŭ ĉiuj aranĝoj estas farataj surloke de la loka organiza teamo.

**61-a Internacia Junulara Kongreso, Zakopane, Pollando, 2005**

## Pri membriĝo en UEA/TEJO

Se vi volas

- aparteni al la universala unuiĝo de esperantistoj, kiu havas membrojn en 112 landoj de la mondo;
- laŭ propraj ebloj kontribui al la evoluo de Esperanto en ĉiuj kvin kontinentoj;
- aldoni al via poresperanta agado internacian nivelon

kaj se vi subtenas la statutajn celojn de UEA, tiukaze vi estas invitata iĝi individua membro de UEA aŭ de ĝia junulara sekcio TEJO!

La individuaj membroj de UEA/TEJO ricevas:

- ĉiumonatan revuon *"Esperanto"* / Junaj membroj krome senpage ricevas revuojn "*TEJO-tutmonde*" kaj "*Kontakto*" (kategorio "Membro-Abonanto");
- Jarlibron de UEA, kiu enhavas liston de la kontaktadresoj de la Delegita Reto, la plej amasa internacia kunlabora sistemo de Esperanto-movado kaj multajn valorajn informojn pri la monda E-movado;
- rabatojn ĉe aliĝoj al Universalaj Kongresoj de Esperanto (Internaciaj Junularaj Kongresoj - por junaj membroj) kaj ĉe aĉetoj en la Libroservo de UEA;
- voĉdonrajton por elekti la gvidorganojn de UEA / junaj membroj - ankaŭ elektas la gvidorganojn de TEJO (krom la kategorio "Membro kun Gvidlibro");

## Delegitoj de UEA en Slovenio en 2004

Ĉefdelegito: Anka Dvoršak. Delegito: Branko Vrbinc. Delegito kaj Fakdelegito: Djordje Obradović,. Fakdelegito: Janko Štruc.

## LETERO DE LA ĈEFDELEGITINO DE UEA

Estimataj geamikoj!

Mi informas vin pri pagado de UEA-membrokotizoj por la jaro 2005, pri pagado de la kongreskotizo por la 90-a Universala Kongreso de Esperanto en Vilno, Litovio, kaj pri abontarifoj de la libroservo de UEA.

### 1. KOTIZTABELO DE UEA POR 2005

| Kategorio | Kotizo | Priskribo |
|---|---|---|
| MG | 4 eŭroj | Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado |
| MJ(-T) | 11 eŭroj | Membro kun Jarlibro (kaj, ĝis inkl. 29 jaroj, membro de TEJO kun la revuo *Kontakto* sen plia abonpago) |
| MA(-T) | 28 eŭroj | Membro-Abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo *Esperanto* |
| DM(-T) | 700 eŭroj | Dumviva Membro: pagas por la tuta vivo 25-oblon de la kotizo MA; ricevas la Jarlibron, la revuon *Esperanto*, kaj ĝis inkl. 29 jaroj, la revuon *Kontakto* |
| DMJ(-T) | 275 eŭroj | Dumviva Membro kun Jarlibro: pagas por la tuta vivo 25-oblon de la kotizo MJ; ricevas la Jarlibron kaj, ĝis inkl. 29 jaroj, la revuon *Kontakto* |
| SA | 18 eŭroj | Simpla abono al la revuo *Esperanto*, sen membreco en UEA |
| Kto | 11 eŭroj | Abono al la revuo *Kontakto*, sen membreco en UEA/TEJO |
| SZ | 56 eŭroj | Kotizo por Societo Zamenhof; mecenata kategorio (aldoniĝas al alia kotizo; ne inkluzivas membrecon en UEA) |
| PT | 30 eŭroj | Patrono de TEJO: pagas 3-oble la kotizon de MJ(-T) por subteni TEJO (ne inkluzivas membrecon); ricevas la revuon *Kontakto* kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO |

### 2. KOTIZO POR LA 90-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, 23 – 30 julio 2005, VILNO, LITOVIO

Mi rekomendas, ke la membrokotizon kaj kongreskotizon vi pagu plej malfrue ĝis la fino de tiu ĉi jaro per enpagilo al mia konto 02010-2759945816 ĉe NLB kaj ne forgesu noti, kion vi pagas. Krome informu min al poŝtelefono 040 232 451 per mesaĝo. Kotizojn vi povas pagi per tolaroj je oficiala ŝanĝo-kurzo de "Nova Ljubljanska banka" je la tago de la pago. Pro kurzaj diferencoj kaj sendokostoj aldonu unu eŭron.

### 3. ABONTARIFOJ 2005 DE LA LIBROSERVO DE UEA

(prezoj en eŭroj sen 6% imposto en Eŭropa Unio)

| Revuo | N-roj jare | Jara abono |
|---|---|---|
| **Brazila Esperantisto** (aere) | 4 | 18,00 |
| **Brita Esperantisto** | 2 | 8,40 |
| **Bulgara Esperantisto** | 4 | 12,00 |
| **Dia Regno** (KELI, aere) | 6 | 18,00 |
| **Esperantisto slovaka** | 4 | 20,00 |
| **Esperanto, L.** (itala) | 9 | 28,00 |
| **Esperanto sub la Suda Kruco** (aŭstralia, novzelanda, aere) | 6 | 23,70 |
| **Espero Katolika** (IKUE) | 6 | 29,50 |
| **Espero, La** (sveda) | 6 | 20,00 |
| **Fonto** (literatura, aere) | 12 | 30,00 |
| **Gazeto, La** (kultura) | 6 | 29,00 |
| **Heroldo de Esperanto** | 17 | 32,00 |
| **ICEM-Esperanto** (Freinet-pedagogio) | 4 | 18,30 |
| **Informilo por Interlingvistoj** | 4 | 7,00 |
| **Internacia Pedagogia Revuo** | 4 | 18,00 |
| **Jaro, La** (agendo,aere) | 1 | 8,00 |
| **Juna Amiko** (por lernejanoj) | 4 | 14,00 |
| **Kancerkliniko, L**a (ajnista) | 5 | 22,00 |
| **Komencanto** (facila, amuza, instrua) | 7 | 15,00 |
| **Kosmos** (filozofia) | 2 | 8,00 |
| **Literatura Foiro** | 6 | 30,00 |
| **Litova Stelo** | 6 | 14,00 |
| **Medicina Internacia Revuo** (aere) | 3 | 13,60 |
| **Monato** (novaĵmagazino)<br>*reta versio* | 11 | 44,00<br>26,40 |
| **Norvega Esperantisto** | 6 | 11,50 |
| **Ondo de Esperanto, La** (rusa) | 12 | 27,00 |
| **Oomoto** (religia/kultura, aere) | 2 | 13,80 |
| **Scienco kaj kulturo** | 6 | 30,00 |
| **Sennaciulo / Sennacieca revuo** | 12 | 57,00 |
| **Simpozio** (filozofia) | 2 | 9,00 |
| **Starto** (ĉeha) | 4 | 10,00 |
| **TEJO tutmonde** | 4 | 11,00 |
| **Tempo** (kroata) | 6 | 11,40 |

Al la abonprezo nepre aldonu 6% aldonvaloran imposton.

Atendante vian kunlaboron mi sincere salutas vin!

Ljubljana, la 10-an de decembro 2004

Anka Dvoršak
Maroltova ulica 8
1000 Ljubljana

**INFORMACIJE / INFORMOJ** izdaja / eldonas Združenje za esperanto Slovenije / Slovenia Esperanto-Ligo, Tavčarjeva 2/I, p.p. 1643, SI-1001 Ljubljana, Slovenija. / Slovenio. Matična št. / kodnumero 5058384. ID za DDV / n-ro por AVI: SI93737777. Transakcijski račun / bankkonto: 02015-0012704490 pri / ĉe Nova Ljubljanska banka d.d.. (Bankkonto por eksterlando: SI56020150012704490 ĉe Nova Ljubljanska banka d.d., Swift-kodo: LJBASI2X)